

Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2010 numero 4-a: novembro-decembro
dissendo je la 1-a de novembro



TAHIRA Masako kaj Mireille GROSJEAN.

TAHIRA Masako, laborema malgranda virino tre efika kaj tre afabla, estas unu el la pilieroj de la japana esperanto-movado. Ŝi ĉiutage korektas multajn artikolojn kaj verkojn de aliaj esperantistoj. Ŝi estas komitatano A por Japanio en la komitato de UEA, kie Mireille Grosjean same deĵoras, kaj ili kolegiĝis kaj amikiĝis renkontante sin ĉiujare ekde 1998 en Montpellier. Kiam Mireille ekplanis kulturen vojaĝon al Japanio, tiam Masako invitis ŝin al sia hejmo. Konkrete Mireille gastigis sume dum tri monatoj ĉe ŝi en Kyoto mem, kaj Masako solvis ĉiujn ŝiajn problemojn, dezirojn, bezonojn tuje kaj efike, eĉ deĵorante kiel interpretisto ĉe kuracisto ! Ŝi fakte fariĝis kvazaŭ konstanta kunlaborema sekretario de Mireille dum ŝia sesmonata vizitado de la japana esperanto-movado. Tial Mireille ege dankemas al ŝi pro ŝia amikeca helpado.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio :

Claude Gacond, Str. Chevreuils
14, CH-2300 La Chaux-de-Fonds

Retpoŝto : gacond@bluewin.ch

Tel. : hejme: 032 926 52 32
ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:

Nancy Fontannaz, Stefano Keller,
Richard Schneller

SES informas

Redaktaj datlimoj

2011-1 : januaro-februaro :
decembre 15, dissendo 1-an de januaro.

2011-2 : marto-junio :
februare 10, dissendo 1-an de marto.

2011 3 : julio-oktobro :
julie 1, dissendo 15-an de aŭgusto.

2011-4 : novembro-decembro :
oktobre 10, dissendo 1-an de novembro.

Konsultu la retejon de SES !

www.svisa-esperanto-societo.ch

SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto, Grand-Rue
9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18 88 kaj
079 69 709 66.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, Archstr.
2, 8610 Uster. Tel.: 044 251 50 25. Retpoŝto :
info@esperanto.ch

Stefano Keller, sekretario, CP 6034, 1002
Lausanne. Tel.: 076 261 06 09. Retpoŝto:
kellerstefano@gmail.com

Marie-Louise Mûnger, kasisto, Rue Centrale
4, 2112 Môtiers. Tel. : 032 861 26 28.

Retpoŝto : ml.munger@bluewin.ch

Nelida Weidmann González, respondeca por
familiaj renkontiĝoj kaj aktivecoj. Archstr. 2,
8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25.

Poŝta ĉekokonto :

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds


Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

Vivo de SES

2010-4 • Redaktis: Stefano Keller



Protokolo de la Estrarkunsido de Svisa Esperanto-Societo, okazinta en Bielo, la 1an de septembro 2010

Estraranoj ĉeestintaj:

Mireille Grosjean, kun-prezidanto ; Dietrich Weidmann, kun-prezidanto ; Marie-Louise Münger, kasisto ; Stefano Keller, sekretario.

Senkulpigita: Nelida Weidmann, estrarano.

Temoj traktitaj :

- **Nova kasisto.** La plena faka transpreno de la kasaj aferoj ne povis realiĝi pro teknikaj malfacilaĵoj. Aĉeto de portebla komputilo por la administraj-kasistaj bezonoj de SES estis decidita (profitante pri rabata periodo en fakvendejo).

- **SFERO-j 2010 kaj 2011.** Ĉi-jare la familia renkonto okazas en Métabief. SFERO 2011: Mireille jam subskribis la kontrakton por la ejo en Richterswil. Nelida okupiĝas pri la projekto programa.

- **Lokoj de venontaj Ĝeneralaj Kunvenoj.** 2011: Estis proponita Vevey, ĉirkaŭ la muzeo de la ludoj. Sed la muzeon jam vizitis kelkaj svisaj grupoj, tial (kaj por kunveni foje en alilingva regiono) jenaj loko kaj dato estis elektitaj por la venontjara ĜK: Tiĉino, 26an de marto 2011 (konfirmota), kun invito al italaj esperantistoj. Pri 2012 ni decidis poste (eble : Markthalle Altenrhein).

- **Retejo de SES.** Krom kelkaj modifoj en la paĝaro, ni planas aperigon de prezento de la estraranoj. Iom post iom ekaperas plenaj kajeroj de SESi, pdf-e. Decidiĝis la publikigo de reta kalendaro listiganta la svisajn esperantajn eventojn. Luko Allemand kunlaboros pri tio.

- **SonSESio: sona revuo de SES.** Stefano pretigis unuan numeron de sona versio de *SES informas*. Ĝi aŭskulteblos de la paĝo de la pdf-e publikigitaj numeroj de nia bulteno. Sonmaterialo el ĉiu regiono, de grupoj kaj individuoj estas petata.

- *Festado de la 80-jariĝo (20-08-1931) de Claude Gacond.* S-ro Reinhard Haupenthal ekredaktis kaj produktos festlibron por honori la 80-jariĝon de Claude Gacond, kiu estas ne nur fondinto/kreinto de KCE, CDELI, sed ankaŭ longdaŭra motoro de la svisa esperanta movado. Diversaj iamaj kaj aktualaj kunlaborantoj de Claude (ne nur el Svislando) verkos erojn de la libro. SES subvencias la eldonon de tiu libro per la monsumo de 3'000 svisaj frankoj kaj aĉeto de 30 libroj. Mecenatoj, antaŭmendoj estas bonvenaj. Festo okazos en CDELI, sabate, la 27an de aŭgusto 2011.

- *Enketo.* Ekzempleroj de la papere kaj rete publikigita enketilo pri la atendoj, kunlaboremo, sugestoj de la svisa esperantistaro komencas reveni plenigitaj. Mireille pretigas la tabelon de la rezultoj.

- *Planoj por SES.* Celpubliko, aktivecoj kaj varbado dum 2011: ĉefa varba agado en 2011 okazos en Germanio per publika koncerto dum SFERO. Ni laboros pri reta disponigo de diversaj varbiloj, kaj pri informado inter gejunuloj.

- *Diversaĵoj.* Jardeko de Lingvoj: SES kontaktos la svisan UNESCO-komisionon pri tiu propono, paralele kun alilandaj similaj elpaŝoj. Pacorganizoj : SES povus iel kunlabori kun svisaj grupoj de porpacaj organizoj.

Protokolis: Stefano



Donacoj ricevitaj dum januaro - majo 2010

S-ro Traugott Rinaldo Aebi, Ittigen (10) - S-ro Luc Allemand, La Chaux-de-Fonds (16) - S-ino Louise Bachmann, Emmen (15) - S-ro David Buhlmann, Prilly (55) - Ges-roj Gabriel kaj Verena Chaves, Flawil (40) - S-ino Françoise Cork, Châtel-St-Denis (20) - S-ino Lucienne Dovat, Renens (235) - S-ro Richard Ducret, Yverdon-les-Bains (15) - S-ino Elisabeth Eisenegger, Zürich (15) - S-ino Renata Filiali, Kriens (50) - S-ino Georgette Friedly, Bernex (15) - S-ino Andrée Gacond, La Chaux-de-Fonds (30) - S-ro Jean-Loup Gaudin, F-Douvaine (5) - S-ro Walter Gaxer, Lausanne (15) - S-ro Ernst Glättli, Brugg (30) - S-ino Mireille Grosjean, Les Brenets (20) - S-ro François Huguenin, La Chaux-de-Fonds (15) - S-ro Noël Huguenin, La Chaux-de-Fonds (10) - S-ro Marc Humbert, Bevaix (40) - S-ro Alois Koller, Zürich (30) - S-ino Mélanie Maradan, Genève (30) - 'Parzival', Biel (10) - S-ino Mady Lynn Reymond, Neuchâtel (10) - S-ro Willi Rieser, Zürich (10) - S-ro André Sandoz, La Chaux-de-Fonds (165) - S-ro Paul Scherer, Emmenbrücke (5) - S-ro Adrian Tanner, Dotzigen

(15) - S-ino Ruth Van Puijenbroek, Winterthur (15) - S-ino Marguerite Viredaz, Lausanne (20) - S-ino Paula Vit , Gen ve (5) - S-ino No lle Vitry, Gugy (5) - S-ro Erich Werner (Cosmoglotta), Hochdorf (50) - Ges-roj Didi kaj Nelida Weidmann, Uster (145). Subtotalo: CHF 1166.- Anonima por la Enciklopedio: CHF 250.-

Entute: CHF 1'416.- Grandan dankon al la malavaraj subtenantoj de SES!

Novaj patronoj de SES, 2010

S-ro Jean-Jacques Lavanchy, La Tour-de-Peilz ; S-ro Luciano Ortelli, Luzern ; S-ino Fran oise P termann, Lausanne ; S-ro Fran ois Huguenin, La Chaux-de-Fonds ; Ges-roj Verena & Gabriel Chaves-Walder, Flawil ; Ges-roj Tazio kaj Teresita Carlevaro, Bellinzona ; S-ino Liliane Siegrist-Gaehler, Romanshorn ; S-ino Andr e Gacond, La Chaux-de-Fonds ; S-ro John Hasler, Ostermundigen ; S-ro Ernst Gl ttli, Brugg ; S-ino Nancy Fontannaz, Pully ; S-ro Traugott Rinaldo Aebi, Ittigen ; S-ro Andr  Sandoz ; La Chaux-de-Fonds ; S-ro Alois Koller, Z rich.



Venu festi kun Claude Gacond

 iuj esperantistoj en Svislando, preskaŭ  iuj, konas Sinjoron Claude Gacond. Kelkaj el ili scias, ke en la jaro 2011, li fariĝos 80jara. Ekde jardekoj li dedi as grandan parton de sia vivo al Esperanto. Mi ne verkis por tiu  i artikoleto vivrakonton lian. Mi nur volas anonci, ke SES preparas festotagon por li. Tiu celebrado okazos en

CDELI, en La Chaux-de-Fonds,
sabate la 27an de aŭgusto 2011.

Bonvolu jam nun rezervi tiun daton, mi petas.

Kun granda  ojo revidi vin tiam (kaj antaŭe kompreneble), mi salutas vin elkore.

Mirejo Grosjean, kun-prezidanto de SES.

Vizitu lian retejon: www.esperanto-gacond.ch



Alvoko al Franclingvanoj

Ni ĉiuj konscias pri la granda influo, kiun amaskomunikiloj havas, kiom ŝlosilaj ili estas en la mondo ĝenerale. En nia kazo, pere de ilia voĉo la ekstera mondo ricevadas informojn pri nia agado, pri nia kontribuo al la monda paco kaj nia engaĝiĝo pri lingvaj temoj. Gravas, do, ke ili komprenigu ankaŭ al EU la rolon de Esperanto.

Mia agado en Francio estas informa por vekigi iliajn amaskomunikilojn pri la EU-lingva problemo. Tiu lando estas ja grava, prestiĝa kaj potenca ne nur en EU, sed ankaŭ mondscale. Ĝi estas, krome, influhava, ĉar la franca estis konsiderata LA internacia lingvo. La voĉo de Francio estas plu aŭdata tra nia tuta planedo kun respekto.



Jam 8 jarojn mi aperigas anoncojn plurlande en Eŭropo, el kiuj 9-foje en Francio. Ili estis sub la rubriko 'Reklamoj', sed mi deziras, ke Esperanto estu traktata kiel novaĵo. Dum mia lastjuna vizito al 'Le Monde' oni sciigis al mi, ke por ke Esperanto estu novaĵo, la ĵurnalo devas konscii pri vera intereso en la publiko. Tion ili taksas pere de reagoj de la legantoj.

La 15-an de decembro en 'Le Monde' aperos denova reklamo. Temos pri 2 paĝoj: unu kun intervjuo al la nepo de D-ro Zamenhof kaj alia kun informoj pri Esperanto.

Lerninte, ke Ĝingis-Hano breĉis nur 5-metre la Grandan Muron por ĉevaloj kaj venkis Ĉinion dum palpebrumo, mi invitas vin agi same.

Jen, do, mia alvoko al vi, franclingvaj Esperantistoj: post la apero de la 2-paĝa anonco bv reagi al la redakcejo de 'Le Monde' papere al: Le Monde, 80 Bd Auguste Blanqui, 75707 Paris Cedex 13, aŭ rete al courrier-des-lecteurs@lemonde.fr. Invitu ankaŭ viajn familianojn kaj geamikojn agi same. Bv skribi NUR franclingve kaj petu, ekzemple, informojn pri denaskuloj, Eŭropa lingva diverseco kaj Esperanto, ĉu daŭra EU-angliĝo taŭgas?, aperigo de pliaj informoj pri Esperanto, ĝia literaturo, ktp. Ankaŭ kritikaj opinioj bonvenas, bezonatas (manko de Esperanto-kulturo, artefarita lingvo ne kompareblas al nature evoluinta lingvo, malriĉaj esprimnuancoj ktp) ĉar nur pozitivaj leteroj estos tuj perceptataj kiel kampanjo. - Antaŭdankas pro via apogo: *Etsuo Miyoshi*

3-a Svisa Feria Esperanto-Renkontiĝo (SFERO)



Ekvespera rigardo al la feridomo *Les Sapins de l'Amitié*.

De la 14a ĝis la 17a de oktobro okazis en la feridomo “*Les Sapins de l'Amitié*” [La Abioj de la Amikeco] en la Ĵurasa Montaro en Métabief la 3a SFERO sub aŭspicio de SES. Métabief situas 9 kilometrojn okcidente de Vallorbe sur la franca flanko de Mont d'Or. Partoprenis 45 personoj el Francio, Germanio kaj Svislando, el inter ili multaj infanoj kaj gejunuloj.



Pretiĝo al vespera prezentaĵo.

Dum ĵaŭdo kaj vendredo estis du mirindaj sunaj aŭtuntagoj, kiuj invitis al migrado. Sabaton malvarmiĝis kaj pluvetis, tamen ankaŭ la sabataj ekskursoj al grimrado aŭ fromaĝejo respektive al la Groto de Vallorbe povis okazi. Sabatvespere Christoph Frank prezentis distran teatraĵon pri notema pedelo, Filipino kaj Avinjo. Dum la matenoj okazis diversaj programoj klerigaj kaj distraj por infanoj, junuloj kaj plenkreskuloj, de fadenludo tra paroladkurso al ĥorusa ekzercado. Dimanĉon posttagmeze la evento finiĝis per bunta programo kun muzikaj kaj artaj kontribuoj de la diversaj talentoj el inter la partoprenantaro. La etoso malgraŭ la malvarma semajnfino estis varma, kaj aparte la ĉeestantoj laŭdis la bonan manĝon. Entute la ejo estis tre bela.



Pupteatraĵo. Weidmanaj fotoj.

Dimanĉe post la 15a horo oni devis bedaŭrinde adiaŭi kaj reveturi hejmen, sed forveturante ni povis diri: „*Ĝis revido venontjare dum la 4-a SFERO en Richterswil apud la Lago de Zuriko!*“ Koncerne al la renkontiĝo en Métabief indas aparte mencii neordinaran festadon de grava datreveno : Mirejo Grosjean kaj ŝia filino Marion Belisle travivis la 25jariĝon de sia esperantistiĝo. Post unua vojaĝo al Japanio en somero 1985 la familio Grosjean vizitis ekspozicion pri Esperanto, kiun Claude Gacond muntis en la alvenejo de la duagrada lernejo de Le Locle. Kaj mirigitaj pri tio, kion ili malkovris, Mireille kaj Marion tuj decidis eklerni la lingvon internacian. Tiam Marion estis nur 9jara. En Métabief ambaŭ mendis desertan kukegon por la 70 gastoj kaj ĉiuj ĝojfestis ilian dudekkvinjaraĝon en la esperanto-vivo.

Laŭ raporto de Nelida kaj Dietrich Weidmann kaj Mireille Grosjean.

Tutsvisa aktiveco

Ni pli intime konatiĝu kun Stefano Keller elektita nova membro de la UEA-Komitato

Dum la Universala Kongreso okazinta en Havano Stefano Keller elektiĝis estrarano de UEA respondeca pri eksteraj rilatoj. Niajn gratulojn ni esprimas al li. Lia nomumo fakte firmige konfirmas la utilan aktivecon, kiun li plenumadas jam de pluraj jaroj kiel reprezentanto de UEA kaj Esperanto en kunvenoj de la ONG (neregistaraj organizaĵoj) ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo. Tio instigu nin pli intime konatiĝi kun nia SES-sekretario per citaĵoj el la aŭtobiografia informo, per kiu li mem prezentiĝis al la UEA-estraranoj.



Aktiva esperantisto ekde la 1970aj jaroj Stefano Keller akiris diplomojn pri instruado kaj psikopedagogio en universitatoj de Budapeŝto. Li daŭrigis siajn studojn en la fakoj edukado, psikanalizo, genetiko/medicino. Komence de la okdekaj jaroj li deĵoris kiel sekretario de UMEA. Krom la internacia li parolas la anglan, francan, germanan kaj hungaran lingvojn, kaj baznivele la hindian kaj sinhalan.

En la okdekaj jaroj li migris al Lausanne por labori kiel kamion-ŝoforo, kaj tiam li ekdediĉis siajn semajnfinojn al instruhelpado en La Chaux-de-Fonds ĉe KCE, kie inter 1984 kaj 1986 li plentempe laboris kiel Esperanto-instruisto. Li fariĝis regula kunlaboranto de CDELI. Diplomito de Internacia Esperanto-Instituto pri Esperanto-instruado laŭ la Cseh-Metodo li organizis prelegojn kaj instruis Esperanton en universitatoj kaj en la laborministerio de Srilanko.

Li studadis etnologion kaj antropologion aŭtodidakte kaj vizitis plurajn regionojn de Ameriko, Azio kaj Eŭropo, kelkfoje kiel delegito de la Neregistaraj Organizaĵoj *Terre des Hommes* kaj Svisa Ruĝa Kruco. Li ankoraŭ aktivis en kelkaj organizaĵoj kiel la Societo por Minacataj Popoloj kaj *Sentinelles*. Fine de la naŭdekaj jaroj li kreis la projekton Esperanto en Maŭricio kaj Madagaskaro. Tiam li esperantigis kantojn de maŭriciaj kaj madagaskaraj artistoj.

Ekde 2006 li estas sekretario de SES, kies bultenon *SES informas* li kunredaktas. En septembro 2006 li kunorganizis la partopreĝon de SES en la ekspoziciejo *Comptoir Suisse*, kie kun aliaj li prelegis kaj alparolis diskutronde.

Tre aktiva en agadoj por lingvaj rajtoj li regule kunlaboras kun mondfamaj lingvistoj kiel Tove Skutnabb-Kangas kaj Robert Phillipson, kaj membras en la Minoritata Esplorreto (*Minority Research Network, Erasmus School of Law, Rotterdam*). Li estis unu el la ĉeforganizantoj de la Simpozio de UEA pri Lingvaj Rajtoj ĉe UN en Ĝenevo (24.04.2008), kaj ekde tiam li pluaktivis en

diversaj kunsidoj de UN. Ekde januaro 2009 li estas ĉefrepresentanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo.

Stefano Keller motivis sian helpemon al UEA per tiuj argumentoj. Ni citas lin :
- *Ĝenerale: atingi tion, ke UEA iĝu la pli kaj pli laŭta kaj respektata voĉo de etnaj, lingvaj minoritatoj. Defendi la lingvaj rajtojn per la disvastigo de Esperanto kaj per efika agado kadre de internaciaj organizoj kiel UN.*

- *Laŭofice: esplori kaj analizi la aktualajn situacion kaj eblojn de interagoj kun la ekstera mondo, trovi, difini novajn okazojn, agadmanierojn kaj strategiojn efikajn cele al planado kaj efektivigo de konkretaj paŝoj. Agadi profesiece kaj prilabori la plej ĝustan vojon al kreskigo de la prestiĝo de UEA kaj de Esperanto ĝenerale antaŭ aliaj NRO-j, same kiel antaŭ la ĝenerala publiko. Aktivuloj akiru influajn rolojn, postenojn en similorientitaj NRO-j, ĉefe ene de la organizo CONGO (la konferenco de NRO-j en konsulta rilato kun UN).*

Sukceson ni deziras al Stefano Keller en la plenumado de lia nova funkcio, tamen kun la espero, ke samtempe pludaŭros lia efika laboro profite al SES kiel sekretario kaj kunredaktoro de *SES informas* kaj al CDELI kiel komputilisto.

Claude Gacond.

-oOo-

CDELI

**Centro de Dokumentado kaj
Esploro pri la Lingvo Internacia**

Bibliothèque de la Ville, Progrès 33
CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds
Tel. : 032 967 68 42.

claude.gacond@ne.ch
martine.schneller@ne.ch
nancy.fontannaz@ne.ch

Venontaj stud-aranĝoj !

Didaktika stud-sabato okazas principe la trian sabaton de la monato en neferia periodo helpe al ĉiuj esperanto-lernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj. Instruas Monika Molnar, Nancy Fontannaz kaj Luc Allemand. Rezervu la sekvajn sabatojn :

Novembre 20,

Decembre 18 interaktiva festo.

2011 januare 22,

Februare 19,

Marte 19.

Petu la detalan informilon.

Por la **Kultura Seminario**, kiun gvidas Claude Gacond, studemuloj rezervu la sekvajn sabatojn :

Novembre 6,

Decembre 4,

2011 februare 5,

Marte 5.

Stud-celoj de la Seminario : Unu el la studtemoj de tiu seminario estas la vortfarado en Esperanto : Ekzameno de la gramatikaj kaj vortfaradaj hezitoj de la unuaj esperantistoj (ĝenerale propraj al ĉiuj lernantoj) kaj malkovro de la sinsekvaj decidigaj kontribuoj kaj roloj de Louis de Beaufront, René de


Saussure, Edmond Privat, Hector Hodler, Julio Baghy, Kálmán Kalocsay, Gaston Waringhien kaj fine István Szerdahelyi. Aliaj temoj ankaŭ okupos nin : legaĵoj, malkovro de verkistoj, respondo al primovadaj kaj prilingvaj demandoj, ktp.

Resumo pri la unua seminaria sabatode la 2a de oktobro : Ni konstatis, ke la *Lingvo Internacia* (1887) de Doktoro Esperanto aŭ L. Zamenhof, same kiel la *Universal Glot* de Pirro (1868) kaj la *Volapük* (1880) de Johann Martin Schleyer apartenas al kategorio de lingvo-projektoj influitaj de la planlingvaj

vidpunktoj de la filozofoj René Descartes (1596-1650), interalie per lia letero al la Patro Mersenne de la 20a de novembro 1629, kaj de Gottfried Wilhelm Leibniz (1646-1716), interalie per lia logika alĝebro ebliganta la kreon de vorttabeloj. La bibliografio aperinta en la volapuka jarlibro *Yelabuk pedipedelas* en 1898 donas ideon pri la verkoj verŝajne influintaj Doktoron Esperanto kaj ankaŭ pri la influoj de Volapük al lia Esperanto.

Claude Gacond.

-oOo-



Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 178, 4005 Basel

Tel. : 0049 76 214 57 12.

Kunvenoj : 20h00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

esperantobasel@gmx.ch

PC : 40-33714-4

Jarkotizo unuopa : Fr 25.-, paro : Fr 30.-

Venontaj kunvenoj

Novembre 25 : Programo 2011.

Decembre 11 : Zamenhofa festo en Francio organizita de la grupo de Mulhouse.

-oOo-

Bern

S-ro Ueli Haenni, Linckweg 2,
Postfach, CH-3052 Zollikofen.

Telefone : 031 911 64 72 (kun respondilo) aŭ oficeje 031 911 23 22.

ueli.haenni@swissonline.ch

-oOo-

La Chaux-de-Fonds

Olivier Tzaut plu kantas

Eble vi scias, ke Olivier Tzaut produktis en 1977 kaj 1981 du

diskojn kun kanzonoj en esperanto, kies plimulto estis adaptoj fare de Claude Piron aŭ eĉ liaj originalaĵoj. Temas pri la diskoj *Tra l'mondo* kaj *Karnavaleta*. Nun Olivier Tzaut regule vizitas hejmojn por maljunuloj por kantmomentoj ege aprezataj, dum kiuj li ĝenerale kantas franclingve, sed ankaŭ ofte aŭdigas siajn kanzonojn en esperanto kaj eĉ en la provenca.

Liaj esperanto-diskoj estis unu el la tre pozitivaj rezultoj de lia kampanjo Esperanto lernejen, kiun li lancis en februaro 1975 en kunlaboro kun KCE. Malfeliĉe post du jaroj de tre aktiva agado poresperanta nesufiĉaj financaj subtenebloj devigis lin reveni al nura plentempa instruista funkcio en la montara lernejo de Mont-Soleil.

Sed restas el tiu agado vere trafaj tekstoj pri esperanto en la franca verkitaj de Claude Piron kaj la du diskoj de Olivier Tzaut, kiujn li mem produktis proprakoste kaj kiujn poste la Kooperativo de Literatura Foiro reproduktis kasede.

Post tiu periodo iom post iom Olivier Tzaut retiriĝis el la movado, sed li tamen ĉiam konservis ligojn kun ĝi, despli ke li loĝas en La Chaux-de-Fonds kaj ke lia forpasinta bofrato Jacques Gacond-Tzaut estis la frato de Claude Gacond. Li ankaŭ konservis kontaktojn kun Giorgio Silfer kaj Perla Martinelli, sed ĉefe tre regulajn kun Claude Piron ĝis malĝoja tago de januaro 2008, kiam Nicole vokis lin posttagmeze por anonci, ke Claude ne plu estas. Li restis en daŭraj amikaj rilatoj kun ŝi.

Partoprenante esperanto-okazaĵojn Olivier Tzaut konstatis, ke la nunaj esperantistoj scias nenion plu pri liaj diskoj kaj pri la kanzonoj de Claude Piron kaj li trovas tion granda perdo por la esperanta kulturo. Iu proponis al li meti liajn diskojn sur la retejon *Youtube* kaj li akceptis tion kun ĝojo. Tiel per tiu rimedo eblas nun al ĉiu reaŭskulti kaj eĉ registri la diskojn de Olivier Tzaut kun la kanzonoj de Claude Piron.

Por la interesatoj dezirantaj ricevi pli da informoj pri la aŭdeblo de tiuj diskoj, jen lia adreso :
Olivier Tzaut, 5, place de l'Hôtel-de-Ville. 2300 La Chaux-de-Fonds
Telefono kaj fakso : 032.926.70.93.

-oOo-

Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 734, 1212 Grand-Lancy 1

Tel. : 022 771 24 37

La kunvenoj okazas en Maison des Associations, rue des Savoises 15

Raportoj

Vizito de Olivier Tzaut

La kunvenon de la Stelo de la 17a de majo vizitis Olivier Tzaut por paroli pri siaj spertoj dum la kampanjo *L'espéranto à l'école* daŭrinta iom malpli ol du jarojn. Dum sia prelego Olivier Tzaut faris interspacojn per kelkaj kantoj kun gitara akompano. Tiel ĉiuj havis la plezuron aŭdi lin kanti kanzonojn, kiujn li tradukis kaj kreis en kunlaboro kun Claude Piron.

Laŭ Arlette Di Vetta.

Vizito de la Muzeo de la Ludoj

La sabaton 21an de aŭgusto por la somera ekskurso la Stelanoj vizitis la Svisan Muzeon de la Ludoj en La Tour-de-Peilz. Sub la gvido de Cesco Reale 10 personoj havis la plezuron malkovri plurajn ludojn el diversaj landoj: la *Awélé* el Afriko, la *Mah-Jong* el Ĉinio, la *Go* el Japanio, la *Pachisi* el Hindio. Poste ĉiuj dum vizito de la salono de la ŝakoj admiradis la skulptaĵojn de la peonoj, sekvis iro al la salono de la kartludoj, kies objektoj tre diversaj forte impresas per siaj formoj, linioj kaj koloroj. Veraj artaĵoj.

La klarigoj estis interese kaj neniu rimarkis la tempopason. Fine de la vizito Cesco Reale invitis ĉiujn ludi en aparta ĉambro per novaj kartludoj, kion ĉiuj efektivigis kun granda plezuro.

Laŭ Arlette Di Vetta.

Prelegis István Mórocz

La 14an de septembro aŭdiĝis belstila esperanto el la buŝo de la malnova esperantisto: István Mórocz, hungardevena zurikano. La ĉeestantoj ĝuis lian rakontadon pri liaj kontaktoj kun la famaj hungaraj esperantistoj Julio Baghy kaj Kálmán Kalocsay. Kortuŝa estis lia lernado gvidata de la grava poeto Julio Baghy. Li spicigis sian prelegon per anekdotoj rilate al okazintaĵoj. Kaj meze de lia rakontado li surpriziĝis, kiam ekcirkulis surtable fotoj faritaj antaŭ kvindek jaroj, kiuj montris lin en aktivado kun la tiamaj membroj de la Zurika Esperanto-Grupo.

Laŭ François Stride.

-oOo-

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

CP 246, 1000 Lausanne 22.

Tel : 021 647 29 28

076 411 14 55

esperanto@citycable.ch

CCP : 10-26785-8

www.esperanto.ch/Lausanne

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon en la monato je la 20h00.

Komitato : Prezidanto : David Bühlmann
Tel. 021 624 36 38 ; Vicprezidanto :
Charlotte Blanc Maillard 079 393 32 63 ;
Sekretario : François Randin 076 411 14
55 ; Kasisto : Sonia Daubercies 079 649 88
86.

Raporto

Tripaĝa bildaro de la Informilo raportas pri la sukceso de prelega vizito de André Cherpillod.

Venontaj kunvenoj

Decembre 12 : Zamenhofa Festo.

2011 Januare 10 : Decidota.

Februare 7 : Ĝenerala Asembleo.

Marte 7 : Decidota.

Aprile 4 : Decidota.

Maje 2 : Decidota.

Junie 18 : Ekskurso.

-oOo-

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke.

Tel. 041 280 46 12.

Kunvenejoj

Gasthaus Adler, Gerliswilstrasse 78, 6020 Emmenbrücke. Tel. 041 281 18 38.

Gastejo **Filali**, Luzernerstrasse 6, 6020 Kriens. (Buso 1, direkto Kriens-Obernau,

haltejo Linde/Pilatus) 041 320 60 86 aŭ
079 658 40 67. renata.filali@bluewin.ch
Ĉe gesinjoroj Anna & Koni Rey, Heimat-
weg 4, 6003 Luzern. 041 210 25 88.

Venontaj kunvenoj

Novembre 3 : Ĉe Filali 14h00-
16h00 : Konversacia rondo kun
Sonja Brun.

Decembre 1 : Ĉe Rey 14h00 :
Zamenhofologio kaj programo 2011
kun Paul Scherer.

2011 Januare 5 : Ĉe Filali 14h00-
16h00 : Konversacia rondo kun
Sonja Brun.

Gastoj ĉiam bonvenas, sed pro
eblaj subitaj ŝanĝoj konsilindas
telefone aŭ rete certiĝi, ĉu la aranĝo
disvolviĝos kiel anoncote.

-oOo-

La Tour-de-Peilz

Svisa Muzeo de la Ludoj

Kontaktabloj kun Cesco Reale:

Telefone: 041-76-234 18 43

rete: cescoreale@gmail.com

Lude kaj samideane Cesco Reale

<http://www.museedujeu.com/>

-oOo-

Wil

Esperanto-Klubo Wil (Orientisvislando)

www.esperanto.ch/wil

Kunprezidantoj: Verena Chaves-Walder,
Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel. : 071
393 41 49. chaves-walder@bluewin.ch kaj
Wolfram Fischer Steigstrasse 12, 9116
Wolfertswil. Tel. : (P) 071 390 04 48 (O)
071 390 04 44. Fax : 071 390 04 47.

Kunvenoj : La esperantistoj kunvenas ĉiun
unuan merkredon en la monato vespere de
la 19-21 h. en la b'treff en Flawil situanta
en la iama stacidomo.

Venontaj kunvenoj

Novembre 3 : Raporto de Verena
kaj Gabriel Chaves pri la Universala
Kongreso en Kubo. Ekkunvene :
rakonta rondo.

Decembre 1 : Rakleda vespero kun
poemoj, rakontoj kaj kantoj.

-oOo-

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Archstrasse 2, 8610 Uster.

Poŝfako 858, 8034 Zürich.

Tel. 044 251 50 25 (dum oficejaj horoj)

Poŝtkonto: 80-17287-1

<http://esperanto.ch/zuriko>.

La kunvenoj okazas en
Centro "Karl der Grosse,
Kirchgasse 14, 8001 Zürich.

Renkontiĝoj regulaj

ĉiam la lastan ĵaŭdon de la monato
en la hejmo de Michael Roesser,
Weinbergstr. 137, 8006 Zuriko je la
20h30 (rekte apud la haltejo "Rössli-
strasse" de la tramoj 7 kaj 15 je 10
minutoj de la ĉefa stacidomo).


**Informoj pri la aktuala programo
de Esperanto-Societo Zuriko
troviĝas en la reto sub:**

www.esperanto.ch/zuriko/programo.ht

zuriko@esperanto.ch

<http://esperanto.ch/zuriko>

-oOo-



Kongresen

Italaj strandoj anstataŭ kubaj

Nicole Margot



Jam de longe mi deziris partopreni Italian Kongreson, por aldoni agrablajn turistadon al kutima kongresa enhavo. Tiun jaron mi ne povis rezisti al la perspektivo kongresi ĉemare. Nu, la iom tro industria amasturistejo de la adriatika bordo momente iom hezitis min. Sed de longe mi ne banis min en mara akvo, kaj la sablaj strandoj estis decidigaj. Plie la kongresa studemo certe ebligas ne nur tuttage stulte sunumi.

La 77a Itala Kongreso de Esperanto okazis finaŭguste en Linjano Orsabra (Lignano Sabbiadoro), inter Triesto kaj Venecio en Friulo. Eblis trajni ĝis Latisana, kaj tie jam vidi

esperantistojn bone informitajn pri la loko, kiuj helpis trovi la ĝustan buson kaj eliri je la ĝusta haltejo por eniri la ferian vilaĝon GeTur, Pineta (Pinejo). Finfine, post informpetado tra portebla telefono, ni alvenis al la akceptejo, kie ni havis la ŝancon vicigi nur unu horon por ricevi nian ĉambronumeron kaj niajn dokumentojn. La tre alta partoprena nombro ja kaŭzis tiun malagrabraĵon, tamen oni demandis sin, kial ĉiu partoprenanto devis sidi kvaronhoron en budo por ĉion ricevi, manĝokuponon en iun manon, ĉambroŝlosilon en la alian kaj kongreslibron ... en kiun ?

Sed oni rapide forgesas la komencajn malagrablajojn aperantajn en multaj kongresoj, kiam la kongresanaro kaj la programo estas

simpatia kaj valora, kiel estis tiu. Ĉirkaŭ 300 partoprenantoj el 27 landoj kreis etoson pli internacian ol nacian.

77ª Itala Kongreso
esperanto
Lignano Sabbiadoro
 Diritti linguistici nella società multiculturale europea

CONCERTI
 ingresso gratuito
 Villaggio Formas Co. Tur. Viale Centrale 29
 PALCO PIAZZALE PINETA

JOMO
 IN CONCERTO
 26 canzoni e 24 lingue

Sabato 21 agosto
 JOMO
 26 canzoni in 24 lingue

Domenica 22 agosto
 Irena Urbaniška
 27 canzoni in 12 lingue

Lunedì 23 agosto
 Mikaelo Bronstein

Martedì 24 agosto
 Jomart & Natasa

NOTTEZZA 4
 Mercoledì 25 agosto
 AMBY

ESPODESPO
 NELLE CANTINE DEI MARI

Giovedì 26 agosto
 George Handeltik

Venerdì 27 agosto
 Internacia vespere
 Serata internazionale

INAUGURAZIONE
 Sala Blu - Centro Co. Tur. Viale Centrale 29
 Domenica 22 agosto h. 10
 professione
 Zlatko Tišljar

PRESENTAZIONE
 Ma l'esperanto è davvero una lingua?
 Sala Blu - Centro Co. Tur. Viale Centrale 29
 Domenica 22 agosto h. 18.30
 prof. Davide Astori
 Università di Parma

con un messaggio di saluto di
 Moni Ovadia
 Scrittore

FEI
 Federazione Esperantista Italiana

Centro Civico
 Via Prentice 2 - Lignano Sabbiadoro
 da sabato 21 a sabato 28 agosto 2010
 MONTA
Esperanto
 lingua internazionale

Corso estivo gratuito di esperanto
 lingua facile
 lingua democratica
 lingua giovane
 lingua viva

Palazzo Pineta - Centro Co. Tur.
 Viale Centrale 29

Lunedì 23 agosto
 h. 9-13 e 16-20
 Martedì 24 agosto,
 h. 9-13
 Giovedì 26 agosto,
 h. 9-13 e 16-20
 Venerdì 27 agosto,
 h. 9-13 e 16-20

Internacia Foiro Fiera internazionale
 Piazza San Giovanni Bosco
 Sabato 21 agosto, h. 17-20

Le associazioni ospiti
 italiane ed estere
 presentano le proprie attività

La turista vilaĝo, kies arkitekturo nostalgie memorigas la 60-ajn jarojn, apartenas al kooperativo, kiu proponas sociajn feriajn restadojn al familioj, junulaj sportaj teamoj, handikapuloj, kaj al organizantoj de seminarioj. Tial la tuta ĉeestantaro montriĝis bunta, junulara, ĝoje brua, en tamen sufiĉe disciplina etoso; la samtempaj vesperaj koncertoj kaj festoj ĉesis, aŭ almenaŭ pli malpli ĉesis brui, je la 11a vespere. Krom la kongresa internacieco la feriantoj de

la vilaĝo ĉefe italis, kaj la pluraj manĝejoj proponis la saman simplan manĝon al pluraj miloj da partoprenantoj, kiuj ofte agrable sidis sub la pinoj. La esperantistoj montris sian ĉeeston dank'al multaj plurkoloraj afiŝetoj algluitaj en la tuta vilaĝo. Ne maloftis la aludoj de neesperantistoj, kiel ekzemple tiu ŝerca rimarko de iu sporta trejnanto al siaj italaj junaj adeptoj: «Ĉu vi ne komprenas min? mi tamen ne parolas Esperanton!»

La kongreso respektis la skemon de la universalaj kongresoj: Malfermo, Internacia Vespero, Fermo kaj eĉ ne mankis la Movada Foiro, tie nomita Internacia Foiro. Ĉiutage ni povis elekti inter seminarioj koncerne du gravajn temojn: “De nivelo al nivelo laŭ la Eŭropa referenckadro” gvidata de Katalin Kováts, unu el la plej bona kaj fama instruistino de Esperanto kaj “Lingvaj Rajtoj en Eŭropo” sub la gvidado de Zlatko Tišlar, sekretario de Esperanto-Eŭropa Unio (EEU).

Mi elektis viziti la duan pri Eŭropo. Kiel povas funkcii federacio de ŝtatoj kun 23 lingvoj egalaj kaj samrajtaj sen baza teksto pri lingva politiko kaj sen mencio de administra lingvo? Ĉiutage ni ekrigardis novan temon pri EU: la statuson de la Minoritatoj en la ŝtatoj, la lingvaj rajtojn, “La diskriminaciajn formojn de lingva praktiko”, “Dialektoj kaj identeca trajto de lingvoj”, “Kion faras EU-instancoj pri lingva demando?” Ni studis la diversajn ĉartojn konstatante, ke en EU ekzistas ĉarto pri minoritatoj, sed ne pri lingvaj rajtoj. La Traktato de Lisbono uzas nur unufoje la vorton **lingvo**. En la unua traktato, eble pluvalida, oni diras, ke «ĉiu havas rajton ricevi respondon en sia (ŝtata) lingvo». Lastatempe oni tamen fariĝis pli konscia pri la problemo, kaj ekde 2007 ĝis 2009 Leonard Orban estis nomita Komisaro por Plurlingvismo. Fine de 2009 la Eŭropa Komisiono (EK) starigis Platformon pri Multlingvismo, kiu kunigas NeRegistarajn Organizaĵojn kaj ekonomiajn

entreprenojn. EEU estis akceptita kiel unu el 29 membroj. Tiu platformo subtenas la raporton Maalouf, kiu rekomendas, ke ĉiu eŭropa infano lernu almenaŭ tri lingvojn, la ŝtatnacion, unu grandan mondlingvon kaj unu “ŝatatan”. Tiu lasta donas ŝancojn al la minoritataj lingvoj kaj eble ankaŭ al Esperanto. La platformo laboras memstare kaj sendepende de EK kaj pristudas por ĝi proponojn pri lingva politiko. Tiu platformo estas nun la sola loko, kie povas labori EEU en la Unio (1)

La vespera programo bonkvalitis: JOMO, Ĵomart kaj Natacha, Georgo Handzlik, Mikaelo Bronŝtein. Plej plaĉis al mi koncerto de la franco Guillaume, kiu tre talente akompanis sin de belsona piano, kantante proprajn tekstojn tre fajnajn kaj emociigajn, sed ankaŭ konatajn francajn kanzonojn.

Mi ne scias, kiam la italoj dormas, sed post la koncertoj je la 23a Davide Astori, kiu instruas Ĝeneralan Lingvistikon ĉe la Universitato de Parmo, proponis diskuti pri la Zamenhofa filozofia koncepto. Mi unue pensis pri ŝerco, sed mire konstatis, ke pluraj personoj ĉeestis la rendevuon kaj ke pli kaj pli pleniĝis la salono. En la sola kunkeno, kie mi ĉeestis, oni interparolis pri la Dogmoj de Homaranismo, demandante sin, ĉu ili “endanĝerigas” la promocion de Esperanto. Kompreneble la ĉeestantaro dividiĝis laŭ du malaj vidpunktoj kaj virino eĉ demandis, ĉu oni ne povus «proponi ideologiaron pli modernan». Male la gvidanto rakontis, ke li tradukis tiujn dogmojn al la itala kaj renkontis kun

ili grandan intereson flanke de ne-esperantistoj. En la Internacia Vespero ni povis aŭdi, ke Georgo Handzlik, kiu ĉeestis la saman kunvenon, verkis tre amuzan kanzonon pri tiu nokta filozofiumado pri Homaranismo.

La venonta Itala Kongreso okazos fine de la somero 2011 ankoraŭ pli proksime al niaj landlimoj, en

Torino, kaj mi esperas, ke tiu eta raporto vin konvinkis ĝin aliĝi.

Noto:

(1) Kompletan raporton pri tiu seminario, fare de Zlatko Tišlar mem, vi povos trovi en la numero 96 de la Eŭropa Bulteno.

Nicole Margot

-oOo-

Nia prelegema nomadulino Mireille Grosjean

Nomada, tia mi estas kaj restos, dum mia sano kaj miaj financoj tion ebligas. Okaze de la Universala Kongreso 2009a en Pollando mi parolis kun Claude Nourmont, vic-prezidantino de UEA, pri miaj multnombraj vojaĝoj ; kaj tiam ŝi sugestis al mi fari prelegeturneon tra Francio. Akceptema mi ekrilatis kun Yves Nicolas, kiu kutimas organizi tiajn eventojn.

La 6an de septembro mi forlasis Svislandon kaj atingis La Ciotat oriente de Marseille. Poste mi veturis dum du semajnoj kaj haltis en Foix, Périgueux, Tours, Angers kaj Strasburgo. Mi povis konatiĝi kun multaj gesamideanoj. Entute mi faris 11 prelegojn. Kelkaj okazis en esperanto en kluboj ; aliaj en la franca por neesperantista publiko. Mi estis invitita por 4 radioelsendoj ; aperis 2 artikoloj en gazetoj. Mi kaptis valorajn varb-ideojn. Do intensa interŝanĝo okazis, por ĉiuj temis pri tre fruktodonaj momentoj. Kompreneble mi tamen povis iom turismi.

Mi tre dankas miajn gastigintojn. Ĉiuj fariĝis bonegaj amikoj.

Mirejo Grosjean.

En packongreso en Oslo

Mireille Grosjean ne nur estas kunprezidanto de SES, ŝi same estas kunfondinto kaj kunprezidanto de ASEPAIX, Asocio Svisa de Edukistoj al la Paco (www.asepaix.ch).

ASEPAIX estas membro de la plej granda kaj malnova tegmenta asocio pri paco : la Internacia Buroo pri Paco (IPB), kiu ricevis la Nobel Pacpremio en la jaro 1910. Tial en septembro 2010 ĝi festis la centjaran datrevenon de tiu grava evento en Oslo mem. Tri membroj de la komitato de ASEPAIX iris al Oslo por partopreni tiun konferencon, al kiu aliĝis 200 personoj, sed fakte partoprenis cento el 15 landoj. Mireille esti unu el ili.

Plie en Oslo Mireille Grosjean povis pasigi du agrablajn vesperojn kaj pliajn momentojn en la loka esperanto-klubo. La osloaj esperantistoj bonege organizis ŝian restadon kaj ŝi povis tranokti ĉe du el ili, kiujn ŝi elkore dankas.

Mireille Grosjean rilatas kun japanaj pacbatalantoj kaj ĉefe kun profesoro Mitsuo OKAMOTO, emerita profesoro de Ŝudo Universitato en Hiroŝima, la direktoro de Hiroŝima Centro por Senperforto kaj Paco, kies portreto aperis kovrilpaĝe de la pasinta numero 2010-3 de nia bulteno *SES informas*. Dum la solena fermo de la menciita pac-kongreso de Oslo ŝi estis invitita laŭtleĝi la esperantan version de teksto de tiu japana pacisto, kiu aperis post la angla en la kongresa dokumento.

Jen ni publikigas tiun dokumenton :

Al monda paco sen militoj kaj sen nukleaj armiloj

Certe okazas multaj militoj en la nuna tempo.

Certe preskaŭ ĉiuj ŝtatoj en la mondo elspezas grandajn monsumojn por aĉeti armilojn.

Certe la tuta stoko da nukleaj armiloj estas grandega.

Certe la klimatoŝanĝiĝo montras, ke la Planedo ne bone fartas.

Certe multaj homoj ne konas siajn rajtojn.

Certe la tutmondaj komercaj kompanioj gajnas multe da mono sen iu respekto al homoj.

Certe egoismo kaj individualismo regas ĉie en la riĉaj landoj.

TAMEN :

Sklaveco malaperis.

Aziaj, afrikaj kaj sud-amerikaj nacioj estas sendependaj.

Apartheid malaperis en Sud-Afriko.

Barbaraj armiloj malpermesiĝis, kiel kontraŭhomaj minoj, kemiaj kaj biologiaj armiloj.

La respekto al homaj rajtoj kreskas.

Ĉirkaŭ 30 landoj ne posedas armeon. Japanoj devas protekti la artikolon 9an de la japana Konstitucio.

Per Esperanto, la monda lingvo de paco, eblas por iu homo paroli kun aliaj homoj el iuj ajn etnoj en plena respekto.

Mi konstatas, ke la fluo de Historio nun estas sur bona vojo.

Certe edukado al homaj rajtoj kaj konfliktoŝolvado devas esti disvastigita kaj kuraĝigita.

Certe la civila socio devas konsciiĝi pri sia povo.

Certe la civila socio kaj movadoj kiel Internacia Buroo pri Paco devas nun komenci gvidi la mondon.

-oOo-

Morto

Arthur Baur-Sallenbach

19.2.1915 – 17.9.2010

Ekde sia 15a jaraĝo Arthur Baur kun nelacigebla viglo kaj talento dediĉis grandan parton de siaj fortoj al esperanto. Jam en la gimnazia aĝo li aliĝis al Esperanto-Societo Zürich, SES kaj UEA, kiujn li servis nelacigeble, malgraŭ sia multokupiteco unue studa kaj poste profesia kaj verkista. Lia redaktora kapablo tuj rimarkiĝis tra liaj publikaĵoj *La Sonilo Malgranda* (1932) kaj poste *La Ĉiulandulo* (1933), kiuj estis pretiĝo al la transpreno de la redaktado de *Svisa Espero* (1951-62). Estas fakte en tiu epoko, ke mi konatiĝis kun li, kiam ekde 1954 mi renkontadis lin en la estrar-kunvenoj de SES en Berno. Neniam longe li povis ĉeesti la kunsidojn pro sia profesia okupiteco kiel redaktoro por la eksterlandaj aferoj de *Neue Berner Zeitung* (1945-59), antaŭ ol transpreni en 1959 la ĉefredaktoradon de tiu taggazeto. Tiam mi provis aŭskulti liajn esperantlingvajn radio-elsendojn de Svisa Kurtonda Servo kaj mi ne imagis, ke foje mi estos lia radio-kolego ekde 1962, kiel posteulo de Edmond Privat.

Kiel radio-kolegoj ni ekkutimis almenaŭ kvarfoje en la jaro trankvile tagmanĝe renkontiĝi post elsendaj registraĵoj, interŝanĝante vidpunktojn pri niaj diversaj aktivecoj kaj ŝatoj. Sed ekde lia ĉefredaktorado de la taggazeto *Der Landbote* de Winterthur en 1967, bedaŭrinde pli kaj pli rariĝis niaj renkontaj momentoj ĉe la radio mem. En siaj prelegoj li ofte raportis pri la svisaj fervojoj, kaj foje ni renkontiĝis en La Chaux-de-Fonds okaze de lia vizito de ĝia stacidomo. Mi aŭdis lin bedaŭri, ke pro bezono modernigi kaj pligrandigi tiujn domojn, la tendenco estas al malrespekto de ilia arkitektura valoro, kaj fakte unuafoje mi ekatentis pri la beleco de la stacidomo de mia urbo. Kiam tiu de Neuchâtel estis fuŝtransformita, tiam mi komprenis lian tristecon.

En nekrologa artikolo ni detale raportos pri la universitataj studoj de Arthur Baur kaj pri la diverseco kaj valoro de liaj verkoj plurlingvaj. Sed hodiaŭ mi fakte adiaŭas al kara kolego Ekde la jaro 1947 li semajnon post semajno disaŭdigis siajn radiomesaĝojn al la esperantistaro tutmonda kaj dum tridekjaroj ekde 1962 ĝis 1992 mi plenumis apud li saman funkcion, kiun li bele priskribis en 1987 sub la titolo *Vivanta lingvo*. « *Kion signifas radio-programoj en esperanto? Diversaj respondoj estas eblaj, sed unu trafas la esencon, nome ili demonstras, ke esperanto estas praktikata konkretaĵo, ke ekzistas tutmonda rondo de homoj, kiuj deziras tiajn elsendojn kaj aŭskultas ilin. Tiujn homojn oni ne povas nomi popolo, ĉar ili ne estas politike organizitaj, sed havas du komunecojn: la saman lingvon kaj la saman idealismon. La ekzisto de tia internacio de aŭskultantoj pruvas, ke esperanto vivas. Vivo ja ne estas ekzakta vorto, ĉar lingvo mem ne povas vivi, korekte estus diri, ke vivas homoj, al kiuj servas la lingvo.* »

Claude Gacond.

Redaktas: Richard Schneller (rs), Rue Charles-Knapp 20, 2000 Neuchâtel,
rischneller(ĉe)gmail.com.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Lingva problemo aŭ lingva riĉeco en Svislando

* Nicole Margot

Ŝajnas, ke la debato pri lingvoj en Svislando aparte viglis dum tiu jaro, kaj ofte la esperantistoj estis rekte koncernataj de la debato.

Mi ŝatus tie reveni al la temo laŭ mia propra vido de la afero kaj laŭ miaj ĉi-jaraj spertoj pri tiu vasta temo.

Intervenoj de Antonio Hodgers en la gazetaro

Komence de februaro Henri Masson atentigis en iu reta listo, ke la ĝeneva ekologiista deputito Antonio Hodgers provoke proponis en la *Tribune de Genève*, ke la angla fariĝu la Esperanto de Svislando.

Antonio Hodgers, 34-jarulo, instaligis 12 monatojn en Berno por, interalie, studi la germanan kaj por, diras li, alproprigi tiun Alemanion, majoritatan en Svislando: «La federala politiko fascinas. Svislando travivas momentojn aparte malfacilajn. Kio evidentis, ne plu evidentas. La dudekunjarcenta Svislando kreas!» Li konstatas, ke

«la romanĉa estas nacia lingvo kvankam ĝi preskaŭ ne plu parolatas, dum male la alemana, kiu estas la lingvo de kvin milionoj da Svisoj, ne estas nacia lingvo.» Li aldonas sian propran sperton, ke en Alemanio, kiam la diskutoj fariĝas seriozaj oni parolas alemane.

Henri Masson, Mireille Grosjean kaj Stefano Keller kontaktis lin por informi pri Esperanto kaj li tuj konvikiĝis pri la valoro de tiu lingvo.

La 15an de marto Xavier Comtesse, la tiama romanda direktoro de «Avenir Suisse» (Svislanda Estonto) estis konfrontita al François Grin en la romanda radio pri la sama temo. Ankaŭ tie Esperanto estis menciita de F. Grin. Sed la interveno de Xavier Comtesse, tiu reprezentanto de la ekonomia medio, simpatianto de la uson-anglosaksa medio, multe malpli interese traktas la problemon, nur favore al tutusonismo; tial mi preferas sekvi la debaton laŭ la Hodgers-vidpunkto, kiu, laŭ mi, alportis ion novan.

La 23an de marto Antonio Hodgers estis intervjuita en *Le Matin*.

Iom moke oni traktis lin de « Oin-Oin en la Rösti-lando » (1) kaj daŭrigis : « Vi proponis Esperanton kiel nacian lingvon, la Oin-Oin-aventuroj pluas ! » – « Vi preferas la romanĉan, ĉu ? », respondis Antonio Hodgers, « Esperanto estas lingvo, eĉ se ĝi ne posedas geografiajn radikojn. Kaj plue ni devas eliri la tro dece tradician politikon ! »

La morgaŭon li denove esprimiĝis en la opinia rubriko de *Le Temps*, laŭ artikolo jam aperinta germanlingve en la *NZZ am Sonntag*. En tiu lasta teksto li montris interesan maturiĝon pri la afero kaj proponis tri scenariojn, certe taksatajn kiel ege malrealistaj fare de multaj, sed kiuj montras tre klaran komprenemon de la problemo liaflanke. Li konstatis unue, ke 52% da svisaj alemanoj konsideras la germanan kiel fremdan lingvon, kaj ke la normgermana (Standarddeutsch) estas nenies gepatra lingvo. Tiu situacio fake nomita « modala dulingveco » (pli simple dirite « ia formo de dulingveco », t. e. la fakto paroli lingvon kaj skribi alian) havas diversajn konsekvencojn. Unue ĝi bremsas enlandan moveblecon, due ĝi komplikigas la integriĝon de la enmigrantoj, trie, la dialektoj formas bazon al teritoria kaj socia identeco ne facile kundividebla. Multaj alemanoj preferas, ke ilia dialekto ne lerniĝu ĉar ĝi estas tro ligita al iu familia kaj afekcia dimensio ; kaj tiu sinteno povas esti komprenata kiel forĵeto de aliuloj. Konsiderante ke la uzo de la alemana tendencas plifortiĝi en la lernejoj kaj en la gazet-

aro, li do proponas la tri elektindajn scenariojn jam menciitajn :

1. Limigi la uzon de la dialektoj nur al familioj kaj al iuj kulturaj medioj, kaj uzi la norman germanan lingvon en plej multaj laborrilatoj kaj en la publikaj komunikadoj, kiel okazis antaŭe. Sed tio postulus politikon devigan, ne akcepteblan flanke de la alemanoj.

2. La alemana meritas nacian statuson anstataŭ la norma germana, kiel okazas por la flandra, kiu ankaŭ estas derivaĵo de la germana lingvo en Nederlando kaj en Belgio. Sed tio havus gravajn konsekvencojn por la svisaj minoritatoj. Ĉu ili akceptus rezigni pri lingvo parolata de 90 milionoj da eŭropanoj profite al lingvo parolata de 5 milionoj da svisoj ?

3. Anstataŭ havi plurajn naciajn lingvojn, havi nur unu, kaj plurajn regionajn. Tiel ĉiu parolus la lingvon, kiun li volas en sia regiono, kaj tutfederale unikan nacian lingvon, kiu devus esti neŭtrala por konservi la regionajn ekvilibrojn. La plej romantika elekto estus la romanĉa, kaj la plej interesa je intelekta vidpunkto estus Esperanto, dum la plej realista estus la angla, jam larĝe enkondukita en la lando. Sed ĉu la Svisoj pretus paroli eksterteritorian lingvon ?

Antonio Hodgers mem konscias, ke neniu el liaj proponitaj scenarioj konvinkos svisojn, kaj li asertas, ke en lia pripenso tute ne enestas kritiko al iu aŭ alia lingva komunumo de Svislando. Sed por li multe pli grave estus ignori la problemon.

Mi ne havas la tempon en tiu prezento analizi tiun tekston, kiun mi konsideras kiel gravan diskutbazon, sen tamen konsenti kun ĉio. Multaj diskutoj sekvis en la svisa gazetaro, sed nun mi deziras iri al alia punkto de la temo.

Kio fariĝas por la interkompreniĝo de Svisoj ?

La ekonomiaj medioj preskaŭ nur antaŭenmetas la uzon de la uson-angla lingvo en Svislando, sed inter la kulturaj medioj, pli modeste, sed eble pli honeste, ekzistas tamen agadoj por provi kunigi Svisojn kaj interrilatigi la diversajn regionojn.

SRG SSR – idée suisse
SRG SSR – svisa ideo

Mi penis trovi la historion de tiu titolo, nur en la franca. Laŭ mia memoro ĝi incis radio-televidan politikon, celante pli integri ĉiujn svisajn regionojn, sed mi nur trovis en la koncerna retejo tiun difinon de la ideo : « *www.ideesuisse.ch* ankaŭ montras kion ni komprenas pere de *idée suisse* : la apudan aŭ samtempan prezentadon de radiaj kaj televidaj elsendoj el la kvar lingvaj regionoj, evidentigante la perceptojn de samaj grandaj eventoj aŭ sociaj debatoj laŭ la regionaj apartecoj. » Mi tiam konstatis en la Romanda radio kaj televido la ŝanĝon de politiko en pluraj kunaj elsendoj pri folkloro ekzemple, *Le Kiosque à Musiques* kaj la unuaŭgusta televida elsendo.

Neue Helvetische Gesellschaft – Treffpunkt Schweiz

Nouvelle Société Helvétique – Rencontres Suisses
Nova Società Helvetica – Incontri Svizzeri
Nova Societad Helvetica – Scuntrada Svizzera
Nova Societo Helveta – Renkontoj Svisaj

Tiu asocio naskiĝis en 2007 el la uniĝo inter « La Nova Societo Helveta » (NSH) kaj « La Svisaj Renkontoj » (Rencontres Suisses – Treffpunkt Schweiz [RS-TS]) kaj ĝiaj celoj estas antaŭenigi la nacian koheremon per pli bona kompreno de gravaj problemoj koncerne kaj la internon de la lando kaj ĝiajn rilatojn kun la ekstero, kaj ankaŭ favori la dialogon kaj la diskutojn. Tiu asocio organizas prelegojn kaj debatojn en tuta Svislando kaj eldonas kvarmonatan bultenon nomitan *Cont@ct*.

CH Stiftung für eidgenössische Zusammenarbeit
CH Fondation pour la collaboration confédérale
CH Fondazione per la collaborazione confederale
CH Fundaziun per la collavuraziun federala
CH Fondaĵo por la kunlaboro federala

Tiu « Fondaĵo CH », kiel oni ĝin malplilongigas, organizas diversajn tutsvisajn manifestaciojn kaj seminariojn, kaj interalie, ĉiun duan jaron, iun internacian literaturan manifestacion en kiu partoprenas la kvar lingvaj regionoj plus unu eksterlanda gasto. La unua okazis en 2006 en Frauenfeld kun la invito de Hispanio, la dua en 2008 en Bieno,

gastigante Pollandon. La lasta disvolviĝis komence de marto 2010 en Koiro, invitante kvar verkistinojn el la alpaj minoritataj lingvoj en Italio kaj Aŭstrio (2). Tiun manifestacion en Koiro mi havis la ŝancon partopreni kaj iom prirakontas ĉi-sube.

**3a Literatura Internacia
Manifestacio « 4 + 1 translatar
tradurre übersetzen traduire »,
5-6an de marto 2010**

En la enkonduko de tiu manifestacio ni povis legi: « En Svislando kunvenas sur malgranda spaco kvar naciaj lingvoj kaj kulturoj. Kultura diferenco kaj renkonto estas granda ŝanco por nia lando. Interŝanĝo inter diversaj kulturaj kaj lingvaj areoj ankoraŭ pli gajnas de landlima transiro (invitante eksterlandan gaston). »

Kiel vi povas legi en la titolo, « la Fondaĵo CH » emfazas tradukon por krei ligojn inter la diversaj kulturoj kunvenintaj, kaj kunorganizis la manifestacion kun Pro Helvetia kaj la Traduka Centro de la Laŭzana Universitato. La tre riĉa programo planita sur du tagoj, teatraj prezentoj, dulingvaj legaĵoj, prelegoj, lingvaj atelieroj, debatoj, plej ofte baziĝis sur tradukoj aŭ pridiskutis ĉu tradukojn ĉu plurlingvajn situaciojn.

La laborlingvo ĉefe estis la germana kaj kiam foje oni uzis la francan aŭ la italan, sekvis traduko en la germana. La romanĉa estis foje uzata por saluti, enkonduki, neniam, krom eraro, por prelegi. Oni povus plendi pri nerespekto de lingvaj rajtoj. Tion mi tute ne faros ĉar preskaŭ ĉiuj ĉeestantoj, alemanoj, romanĉoj

aŭ itallingvanoj komprenis la germanan. La romandoj preskaŭ ne ĉeestis. Kompreneble mi preferus, ke la tuto estu en la romanĉa, mi, latinida lingvulo, certe pli bone komprenus, sed tio apartenas ankoraŭ al revo! Male mi ĝuis la fakton, ke la angla absolute ne estis uzata kaj admiris la grizonanojn aŭ itallingvanojn, kiuj tiom lerte iris de la romanĉa al la germana, al la itala kaj al la franca, kiam tio necesis. Pri Esperanto mi eĉ ne pensis kaj parolos pri tio fine de la artikolo.

Inter la plej interesaj prezentoj mi citos « Helvetan kvarfolian trifolion » kiu kunvenigis verkistojn el la kvar lingvaj regionoj: Oscar Peer, romanĉa kaj germanlingva verkisto, Erica Pedretti el norda Moravio, kiu instaliĝis en la neŭŝatela kantono kaj verkas en la germana, Daniel Maggetti, tiĉinano, kiu vivas en Laŭzano kaj verkas france, kaj Fabio Pusterla, ankaŭ tiĉinano, kiu vivas kaj en Tiĉino kaj en Italio. Same kiel en alia prezento, « Alpa Literaturo », mi vidis homojn vivantajn translingve, se oni povas diri, homojn edukitajn en iu lingvo, kiuj pli malpli vole verkas en alia. Pri tio plej frapis min la du tiĉinanojn, kiuj kvankam samkantonaj lingve evoluis komplete dise: Daniel Maggetti naskiĝis en 1961 en montara vilaĝo de Centovalli, Intragna, kaj unue parolis dialekte. Nur en la lernejo li lernis la italan, kiu neniam fariĝis lia lingvo, kaj kiam li iris studi en la universitaton de Laŭzano, li preferis elekti la francan, kiun li nun parolas kiel parizano. Male Fabio Pusterla naskiĝis en 1957 sude de la kantono, en

Mendrisio, kaj nun vivas inter Lugano kaj Albogasio en la provinco de Komo (Italio). Li amas la italan kaj sentas sin preskaŭ itala.

Ni ankaŭ aŭdis la verkistinon Bessa Myftiu, naskitan en Tirano, kaj ekde 1992 profesorino en Ĝenevo. Ŝi nun verkas en la franca kaj en 2007 aperigis *Konfeso de malaperintaj lokoj*, kiu estis tradukita germanen far Katja Meintel. Dum la manifestacio la du virinoj kune prezentis la libron kaj rakontis iujn tradukproblemojn renkontitajn.

Nur unu romanda verkisto ĉeestis, Blaise Hofmann. Li intervenis kun la romanĉlingva verkisto Arno Camenisch kaj la intallingvano Giovanni Orelli en « Prialpaj Rakontoj : intermitoj ka realeco ». La tri verkis almenaŭ unu rakonton pri Alpoj. La unua en *Estive* rakontas proprajn spertojn pri somera bredado de ŝafoj en la vaŭdaj Alpoj, la dua ankaŭ pri somerado en Alpoj, sed pinte de surselva monto *Sez Ner*, la plej aĝa, Giovanni Orelli *La jaro de la lavangoj*. Oni ĉefe konfrontis la romantismon ligitan ĝis nun al la Alpoj al la junaj verkistoj, kiuj verkas ĉu humure ĉu malmistifike kaj ofte denuncas tiun romantismon.

Ligite kun tiu internacia literatura manifestacio mi mencios :

La « Kolektaĵon CH »

Tiu librokolektaĵo estis kreita en 1974 por kuraĝigi la interŝanĝojn inter lingvaj komunumoj de Svislando. Kun la subteno de la 26 kantonoj, de Pro Helvetia kaj de la Fondaĵo Oertli, 6 ĝis 8 tradukoj de literaturaj nuntempaj verkoj svisaj

aperas ĉiujare. Tiu « Kolektaĵo CH » subtenas lokajn eldonejojn, kiel en romandio, la eldonejon « d'En Bas », por publikigi tiujn tradukojn. Ekzemple ni romandoj povas legi francigitajn tekstojn el la germana, la itala kaj la romanĉa, kiel ekzemple *Sez Ner* de Arno Camenisch, kiun ni povas legi germane, romanĉe kaj france en la sama libro.

Alia interesa projekto estis pridiskutita :

Televida elsendaro por tuta Svislando

En 2008, la ideo pri nacia televido komuna al la kvar lingvaj areoj estis lanĉita kun la labornomo « Arte Suisse ». Tiu projekto antaŭvidas la dismontron de jam ekzistantaj elsendoj kaj programoj kun subtradukoj aŭ duoblaĵoj. Dum la manifestacio ni eklernis pri retejo koncerne tiun projekton, kiu nun ekzistas ekde marto : <http://www.ideeplus.tv>. Ĝi kompreneble kvarlingvas kaj en ĝi vi povas legi preskomunikaĵon anoncanta, ke mocio de la ŝtatkonsilanto Theo Maissen el Grizono (4.3.2010) estis akceptita en la Konsilataro de la Ŝtatoj per 22 voĉoj kontraŭ 7, malgraŭ la opozicio de la Federala Konsilataro (19.5.2010). Mi ne povis trovi la daton de la voĉdono. Sed mi aŭdis, ke tiu projekto jam antaŭe estis rifuzita de la eksdirektoro de « SRG SSR idée suisse » Armin Valpen, ĉar, laŭ li, ĝi tro multe kostus. Sed la partizanoj de tiu projekto replikas, ke se oni nur subtradukas jam ekzistantajn elsendojn la kostoj ne altos. Sur la retejo oni jam povas

spekti televidajn elsendojn, kaj la retejon oni povas subteni per kotizo.

Kion faris kaj faras la Esperantistoj ?

Certe la elsendaro de Svisa internacia Radio dum pluraj jaroj kontribuis al konigo en- kaj eksterlande de la plurfaceta svisa kulturo.

La kulturaj aranĝoj aŭ ĝeneralaj asembleoj aranĝitaj en diversaj partoj de Svislando kontribuas al renkonto de Svisoj kaj al malkovro de aliaj svisaj regionoj. Mi ĉiam memoros pri iu tempe fora renkonto

en Lucerno, kie la lokaj esperantistoj vizitigis al ni la urbon kaj poste prezentis, en lokaj kostumoj, folkloran muzikon.

Mi ankaŭ memoras agrablan promenadon en la ĉirkaŭaĵo de Zuriko, tre konata de lokanoj, sed ne de aliaj svisoj. Pli proksime, la ĉijara ĝenerala Asembleo ebligis nin malkovri Togenburgon, Wil kaj Sangalon. La koruso de Etoy, kiu komencas tutsvisiĝi ankaŭ kreas ligojn inter svisoj.

—oOo—



La Esperanto-Koruso kantis dum la regiona renkonto en Wil

Antaŭ mia veturado al Wil, mi serĉis informojn pri tiu regiono en Vikipedio, kaj mi povis konstati, ke ili estas multe pli kompletaj en Esperanto ol en la franca. Tio sig-

nifas, ke la kontribuantoj al Vikipedio ankaŭ kontribuas al pli bona kono de la diversaj svisaj lokoj. Sed tio restas tre konfidenca kaj meritis esti intensigita kaj pli konata.

Mi diris, ke mi tute ne vidus Esperanton en tiu literatura manifestacio en Koiro, kial? Kiel diras Antonio Hodgers, jes, Esperanto estas intelektu la plej interesa solvo. Sed ĝi restas abstrakta ideo. Jes, ni scias, ke ĝi estus utila por la interkompreniĝo de Svisoj, sed kiel enkonduki ĝin? Kiel komenci?

En Koiro mi forte sentis, ke por esti traktataj serioze, sed ankaŭ por ke nia lingvo ne ŝajnu artefarite en-

falinta en tiun medion, necesus longtempa kaj serioza engaĝiĝo en la afero. Unue por observi, eble por agi aŭ konigi niajn agojn. Tio postulus pli longan pripensadon.

Notoj

(1) « Oin-Oin » estas humura personaĵo romanda.

(2) Pri la alpaj verkistinoj mi parolis en *Etnismo*.

Zamenhof en Vieno – biografia « truo »

* *Bernhard Pabst*

Pri la restadoj de Zamenhof en Vieno en 1886 kaj 1897 por partopreni oftalmologiajn kursojn ĉe profesoro Ernst Fuchs (1851-1930) ni preskaŭ nenion scias. La malmultajn faktojn konatajn Reinhard Haupenthal kolektis okaze de la 150a naskiĝtago de Zamenhof en 2009.

La teksto mem de la 48-paĝa broŝuro en formato A5 okupas la duonon (24 paĝojn), la listo de referencita literaturo la paĝojn 25 ĝis 35 (do preskaŭ kvinonon!), la aldonajo represon de la sola scienca medicina artikolo el la Fundamenta Krestomatio (1903) pri « Kronika katara konjunktivito », « el la libro de profesoro E. Fuchs », kiel Zamenhof indikis, kaj la samteman artikolon el tiu germanlingva Lernolibro de Oftalmologio (okulkuracado) verkita de Fuchs (1889). Kvankam 119 (! se mi ne misnombris) bio-

grafioj, libroj kaj artikoloj studitaj, kvankam korespondado kun preskaŭ deko da ekspertoj de Rusio ĝis Parizo, la monatoj de Zamenhof en Vieno restas pli-malpli sekreto. Jes, ni scias, ke li loĝis en Florianigasse 8 en la hotelo de Erhard Hammerand, kies foton Haupenthal malkovris en Parizo kaj metis sur la dorsan flankon de la titolpaĝo apud tiun de Fuchs kaj junaĝa Zamenhof. Jes, ni ekscias, ke la memortabulo fiksita sur la domo en 1959 okaze de la 100a naskiĝtago (vidu la titolbilon) enhavas ne malpli ol tri « grasajn » erarojn (malĝusta jaro de restado en Vieno, malĝusta studloko, malĝusta mortotago!). Jes, Haupenthal starigas la ĝustajn demandojn, precipe, ĉu Zamenhof dum la unua restado en 1886, do nur jaron antaŭ la apero de la *Unua Libro*, eble ekhavis kontaktojn al la tiam florinta Volapuka movado en Vieno aŭ al la tiea juda intelektularo. Kaj plue: kiujn verkojn li legis en Vieno krom la lernolibron de Fuchs?



Memortabulo pri Zamenhof en Vieno

Sed, ho ve !, respondon ankaŭ tia scioriĉa esploristo kiel Hauptenthal ne (jam) povas doni. Konservigis *neniu* letero aŭ poŝtkarto el la vienaj monatoj, taglibron Zamenhof ne skribis, perdiĝis lia privata biblioteko en bombatako en 1944. Ĉu

Hauptenthal pravas, se li artikol-fine prognozas : « Tiuj demandoj probable ne plu estos respondeblaj » ? Diligenta studo, miacie la plej preciza pri la vienaj monatoj en la vivo de Zamenhof. Preterpase Hauptenthal lakone, sed trafe kategorias la dekduon da biografioj de Zamenhof (« hageografio », « historie serioza »). Interesa kaj leginda, eĉ se la rezulto estas (ĉu neeviteble ?) iom seniluziiga. Unu sola pretervido ne ŝanĝas la impreson (p. 22 : « En 1913 li [Zamenhof] interrompis sanatorian restadon en *Bad Nauheim* por partopreni la entombigon de Carlo Bourlet ... » ; evidente legu « *Bad Neuenahr* » anstataŭ « *Bad Nauheim* » – iafoje dormetas eĉ Vergilio).

Hauptenthal, Reinhard: Die Wien-Aufenthalte von Lazar Markovic Zamenhof (1859-1917) und seine ophthalmologischen Studien bei Ernst Fuchs (1851-1930) – ein Beitrag zum 150. Geburtstag Zamenhofs. Reinhard Hauptenthal. Saarbrücken: Ed. Iltis 2009, 48 paĝoj, ISBN 978-3-932807-79-4 (broŝ.).

Virina plimulto en la svisa registaro

(rs) La elektoj por la Federacia Konsilio de la 22a de septembro 2010 rezultis per plimulto de virinoj, kio estas novaĵo por Svisio, kiu akceptis la voĉdonrajton por virinoj nur antaŭ kvardek jaroj (1971). Post Finnlando, Svisio estas la dua ŝtato kiu havas virinan plimulton en la registaro. La Federacia Konsilio (registaro) konsistas el sep federaciaj

konsilistoj (ministroj, la decidantoj) kaj la kancelierino (administra funkcio).

La unua virino eniris la konsilion en 1984. Menciindas ke la prezidanto de la Federacia Konsilio por 2010 estas virino (Doris Leuthard) kaj ke la prezidantoj de ambaŭ ĉambroj de la parlamento ĉi-jare estas ankaŭ virinoj.

Eble la situacio de la virinoj en Svisio ne estas tiel eksterordinara. Ekzemple en la parlamento la proporcio de virinoj estas je 25%. Svisio tiurilate estas sur la 22a loko, dum najbaraj landoj kiel Aŭstrio je la 12a

kaj Germanio je la 14a loko. En la ekonomia vivo virinoj en gvidaj pozicioj estas maloftaj kaj ĝenerale virinoj gajnas mezume 20% malpli ol viroj.

Ne, Esperanto ne facilas

* *Nicole Margot*

Averto : Tiu artikolo intencas provoki la leganton, ĝin fontigis malbona humoro, foje kolero, kies kaŭzon vi malkovros sube.

Ekzistas sanktaj koleroj, oni diras, tamen tiu ĉi ne sanktas, ĝi nur provas transformiĝi al racia, paca kaj amika, tamen provoka pripenso. Provoka jes, tamen ne ŝerca, la temo gravas laŭ mi. Do, se vi rekonas vin en miaj kritikoj, pensu, ke parto de tiuj kritikoj ankaŭ celas min mem. Vi kompreneble ankaŭ rajtas ne samopinii kaj konsideri miajn vortojn nur kiel kontribuon al opiniinterŝanĝoj. Nu, ek!

Pri facileco

Neniam, sed absolute neniam plu mi propagande diros, ke Esperanto facilas. Fakte delonge mi preferas diri, ke ja ĝi havas regulan kaj simplan konjugacion, ke la tuta gramatiko pli-malpli senesceptas, sed vera lingvo ne povas facili. Vi volas pruvon, ĉu? Jen almenaŭ kelkaj konstatoj pri tio.

Mi eĉ legis, ke – kompare kun la uzo de la angla en internaciaj me-

dioj, kie la partoprenantoj, ekster la oficiala programo, tuj retroviĝas kun samlingvanoj por babili ŝtatlingve – la esperantoparolantoj uzas sian lingvon komforte, eĉ ekster la oficiala programo, kaj ĝis meznokte agrable kaj sen neniu laco amindumas en la Internacia Lingvo! Sed tute ne!

Pri krokodilado

Mi spertis, ke male dum internaciaj kongresoj ĉiuj krokodilas en sia gepatra kaj pro tio devas rezervi manĝotablon por samlingvanoj. Jes krokodilado estas profunde enradikigita valoro ĉe esperantistoj! Kaj subite, kiam tiu krokodilanto devas alparoli malsamlingvanojn aŭ partopreni la kongresan programon, jes, li plej ofte kapablas esprimiĝi, sed iom pene kaj foje slange balbutas!

Malfeliĉe ankaŭ en Svislando tiu kutimo iom post iom instaliĝas. Ĉu svisoj pli talentis pri malkrokodilado ol la aliaj? Ne, ne temas pri nombrileca supereco nek pri aparta lerteco. Sed mi memoras, ke mi ekparolis Esperanton en preskaŭ senkrokodila medio. La tempo beligas la memoraĵojn, diros iuj! Sendube. Sed ne komplete. Koncentriĝe mi re-

troiras al la sesdekaj jaroj, kiam mi ekbalbutis la Internacian Lingvon, kaj mi devas agnoski, ke mi malmulte krokodilis kaj ke la pli aĝaj esperantistoj ĉirkaŭ mi ne tiom krokodilis. Mi ekparolis Esperanton skiante en Adelboden kaj la tutan tagon esprimiĝis nur en Esperanto. Verŝajne mi komence multe silentis. Mi longe konsideris tion kiel normalan, kaj subite nun en lokaj kluboj mi konstatas, ke paroli Esperanton ne plu normalas. Jes, vi bone legas!

En la lokaj kluboj

Antaŭ kelkaj tagoj mi kundividis manĝon, kun dekkvino da esperantistoj. Obstine parolante nian lingvon, mi mire konstatis, ke ĉiuj fuĝis min por krokodili, kaj ke se ne estus hungara gasto, mi devintus ĉu daŭri monologe, ĉu silenti, se ne krokodili!

Antaŭ kelkaj jaroj mi jam surpriziĝis, kiam en loka klubo, oni riproĉis, ke mi nur en Esperanto prelegis, ke komencantoj nenion komprenis. Mi tamen zorgis tiam pri komencantoj kaj plurfoje tradukis vortojn. Ĉu mi iom rapide parolis? Povas esti, povas ne esti, mi ne memoras. Sed mi memoras, ke mi zorge tradukis malfacilajn esperantovortojn kiel en la supre menciita vespermanĝo, kie mi foje malrapide parolis al komencantoj. Sed Esperanto ne nur estas lingvo de komencantoj. Se oni propagandas ĝin kiel normalan lingvon, oni devas povi ĝin ankaŭ flue kaj rapide elparoli. Kaj en tiuj momentoj povas okazi, ke komencantoj ne ĉion komprenas, iom silentas, ekzakte same kiam oni staĝas eksterlande por lerni lingvojn.

Mi eĉ aŭdis iun duonŝerce diri: «Vi opinias, ke mi tro rapide parolas, pensu vi pli rapide!» Eble tio ne ĉiam malsaĝas.

Ĉu paroli Esperanton inter samlingvanoj ?

Iuj respondos kaj jam respondis, ke paroli Esperanton kun samlingvanoj ne havas sencon. Tion mi klare aŭdis lasttage kaj ne unuafoje.

Estas iu vidpunkto, certe respektinda kiel ĉiuj, sed kun ĝi mi forte malkonsentas. Kaj tion ankaŭ celas tiu artikolo : trankvile klarigi al mi mem kaj al vi, kial mi opinias tiun argumenton eĉ perfida. Perfida ĉar unuavide ĝi aspektas tute racia. Zamenhof ne kreis lingvon por la uzo de samlingvanoj sed por ke homoj el malsamaj kulturoj interkompreniĝu. Jes, sed Zamenhof kreis ne nur limigitan slangon, sed lingvon ankaŭ por literaturo.

Esperanto, ĉu « Airport English » ?

La esperantistoj ofte alianciĝas kun la defendantoj de naciaj lingvoj kontraŭ la troa uzo de la angla, en kiu plejofte la parolantoj kontentiĝas per iu limigita slango, iu « Airport English » sennuanca, utila nur por urĝa interkompreno. Ĉu Esperanto devas ludi la saman rolon? Propagande mi opinias, ke ĉiuj esperantistoj konvinke respondos, ke ne, ke la Internacia ebligas ĉiujn nuancojn en la esprimo. Sed en la realo kiom da esperantistoj kapablas esprimi en Esperanto la samajn nuancojn kiel en sia gepatra? Milo en la tuta mondo? Mi forte dubas pri tiom alta nombro.

Eĉ denaskuloj de Esperanto eble ne sufiĉe uzas ĝin por atingi tiun nivelon. Nur la internaciaj paroj kaj familioj, kiuj ĉiutage uzas la lingvon povas atingi nivelon de normala parolata lingvo, kvankam oni povas flue paroli kun eraroj, se oni ne atentigas kaj ne plu studas la lingvon, tion mi bone scias pri mi mem.

Do vidu, ke Esperanto ne facilas. Ne kulpas Esperanto ĉar fakte esprimiĝi klare, sencore, flue kaj komforte malfacilegas en ĉiuj lingvoj. Tamen tiun facilecon ni mensoge propagandas pri Esperanto.

Por reveni al la temo, se ni volas almenaŭ iom proksimiĝi al niaj propagandaj vortoj kaj eble ankaŭ al nia idealo, ni devas multe praktiki la lingvon, parolante, legante, aŭskultante kaj plustudante. Plej ofte por esperantistoj la nura internacia uzo ne sufiĉas kaj, laŭ mia vidpunkto, lokaj kluboj kaj esperantokunvenoj devas resti okazoj por praktiki la lingvon eĉ inter samlingvanoj. Ankaŭ ekzistas avantaĝo al tiu parolado inter samlingvanoj: pli facilas al esperantoparolanto klarigi vortojn kaj lingvouzojn al komencantoj en sia komuna hejmlingvo. En tio grave respondecas la spertaj esperantistoj, kiuj devas lerni rezisti al krokodilado, malrapide kaj simple paroli al komencantoj kaj iom pedagogie agi por helpi ilin. Sed se eĉ ili krokodilas kaj konsideras, ke ne normalas paroli Esperanton en esperanta kunveno, ni devas klare diri, ke Esperanto fiaskas. Kaj tiu situacio nun ofte ekzistas en Svislando kaj en la mondo: Esperanto kiel komunika lingvo inter esperantistoj plej ofte

fiaskas, krom en iuj «elitaj» aŭ junularaj grupoj. Jes ja, la junuloj pli facile lernas kaj eniras la normalan parolan lingvon.

Esperanto kaj plurlingvismo

En nia nuna mondo, en Svislando, en Eŭropa Unio ekzemple, en la makrosocio, kiel diras iuj, oni emfazas plurlingvan edukon, kiu ofte subaŭdiĝas kiel nur usonlingva, tamen foje sincere du- aŭ trilingva. Tio plejofte restas nur pia idealo aŭ tro kosta projekto. Sed se ni bone konsideras nian historion, niaj prauloj tute nature estis plurlingvaj. La aŭstraliaj aborigenoj onidire parolis kaj pluparolas amason da lingvoj tre malsimilajn kaj interkompreniĝas. Pli proksime niaj avoj aŭ praavoj parolis dialekton kaj ŝtatan lingvon, kaj devis adaptiĝi al la dialekto de la apuda vilaĝo. Niaj alemanaj, romanĉaj kaj italaj kuncivitanoj konservis tiun kutimon kaj tial pli facile lernas fremdajn lingvojn ol ni romandoj. Dum jardekoj, ekde la 19a jarcento, ĉefe en la medioj parolantaj hegemoniajn lingvojn kiel la francan, la anglan, la germanan, la italan ktp., oni detruis normalan plurlingvismon de la popolo, nome de iu lingva purismo, kiu kredigis, ke unulingvismo pli valoras por la infanoj. Kaj nun al nia povra reduktita cerbo, kiun ni heredigas al niaj infanoj, oni volas artefarite kaj koste reenkonduki plurlingvan kapablon. Malfacilas. Ankaŭ por lernantoj de Esperanto, kiuj pene eliras sian nur-unulingvecon. Por mi, edukita en tiu nur-unulingveco, la idealo pri Esperanto pli kaj pli miksiĝas kun plurlingva idealo, ofte

pene kaj ŝvite, malofte sukcese. Sed Esperanto helpas. Kaj en tio ĝi ne nur rolas kiel internacia komunikilo, sed ankaŭ kiel liberigilo de mia nur-unulingva karcero. Ĉar temas pri karcero, en kiu mi vidas la mondon nur tra mia nacia kulturo. Sed por ke Esperanto min liberigu mi devas ĝin praktiki, almenaŭ samofte kiel mia gepatra. Kaj se al tiu tasko mi aldonas iujn fremdajn lingvojn, mi konsentas, la tago ne sufiĉas!

Por reveni al nia temo, mi aldonos, ke se mi volas eliri el mia nur-unulingva karcero necesas, ke almenaŭ en esperanto-renkontoj ni parolu Esperanton, eĉ se komence ŝvite kaj lacige, sed certe kun sukcesa rezulto. Tio valoras!

Konklude, mi diras, ke mi volonte daŭrigas la diskuton en iu ajn venonta renkonto, sed malkrokodile!

—oOo—

Nove aperis

La Kernpunktoj de la socia demando en la vivonecesoj de la nuntempo kaj de la estonteco. Rudolf Steiner. Tradukis kaj eldonis Willy Nüesch, Berno, 2010, 112 paĝoj.

(rs) En la katalogo de UEA oni aldonis al la bibliografiaj indikoj la sekvan rimarkon: « Ideoj publikigitaj antaŭ preskaŭ unu jarcento. Ĉu ili ankoraŭ validas? » Se oni prikonsideras la eldonjaron 1919, la demando estas pravigebla. Efektive, por eldono de ĉi tiu verko en la jaro 2010, enkonduko aŭ postparolo estus helpo por la leganto. Ekzemple en la originallingva eldono de la jaro 1996, la konata politikisto Otto Schily, membro de la germana federacia parlamento, montras en postparolo la aktualecon kaj originalecon de la pripensoj de Rudolf Steiner rilate la socian organizadon.

Fakte la pritrakto de la socia demando fare de Rudolf Steiner ne volas esti receptaro por solvi

sociajn problemojn. Post la fino de la Unua Mondmilito li esploris la kaŭzojn de tiu monda katastrofo. Interalie li rimarkigas ke la rutina pensado de la elituloj kondukis al tiu dekadenco de la homaro, kiun evidentigis la granda milito de 1914-1918. La ŝtatoj iĝis malvarmaj monstroj per iliaj nacismo kaj ŝovinismo. Rudolf Steiner kritikis du kategoriojn de homoj, kiujn li nomas la « utopistoj » kaj la « praktikuloj ». Utopiistoj estas la teoriuloj, kiuj prezentas perfektan modelon de sociordo fiksitajn ĝis la plej etaj detaloj, sed kiu praktike ne estas realigebla. Praktikuloj li nomas tiujn, kiuj kredas ke ĉio solveblas laŭ iliaj propraj spertoj kaj rutina pensado, kio lasta ne ebligas trovi novajn dinamikajn vojojn por socia organizado.

Por li la organizo de la homa socio devas sin apogi sur la tiel nomatan « praktikan pensadon » kaj la « observon de la natura vivo ». Li vidas analogion inter la

homa korpo kaj la socia organismo. Steiner distingas tri sistemojn memstarajn, sed kunligitajn ne laŭspace, sed laŭfunkcie : unuflanke la nerva-sensa sistemo, aliflanke la metabolisma-membra sistemo kaj en la mezo la ritma sistemo. Por la tridivido de la socia organismo tio respondas al : la spirita vivo (instruiteco, kulturo, kunlaboro inter homoj), la jura vivo (leĝoj, kontraktoj, reguloj de la socio) kaj ekonomia vivo (produktado, komercado kaj konsumado de varoj kaj servoj). Gvidaj principoj por ĉiu aparta sistemo estas en rilato kun la idealoj de la franca revolucio : libereco por la spirita vivo, egaleco por la jura vivo kaj frateco por la ekonomia vivo.

Steiner malfidas la aŭtoritatan naciŝtaton kaj privilegias asociojn, kooperativojn ktp., kiuj havu sufiĉan liberon por memstara organizado kaj memmastrumado, sed kompreneble estu institucie en rilato inter si per federacia organizo laŭ la principoj de la divido de la povoj kaj tiu de la subsidiareco.

Por ke vi havu ideon pri la pritraktitaj temoj, mi aldonas la titolojn de la kvin ĉapitroj el la *Kernpunktoj de la socia demando* :

1. *La vera formo de la socia demando, kaptita el la vivo de la moderna homaro*
2. *La de la vivo postulataj realokonformaj solvoprovoj por la sociaj demandoj kaj necesoj*

3. *Kapitalismo kaj sociaj ideoj (kapitalo, homlaboro)*
4. *Internaciaj rilatoj de la sociaj organismoj*
5. *Suplemento : Al la germana popolo kaj al la kulturmondo !*

En tiu libro la aŭtoro konscie ne uzas la fakterminojn ekzemple de la nacia ekonomio. Tiel li evitas stereotipojn kaj devigas la leganton al aktiva kulpensado. Evidente oni ne legas tiun pensinstigan pritrakton kiel romanon aŭ sciencfikcion !

Pri la traduko de Willy Nüesch mi povus ripeti tion, kion mi skribis en *SES-informas*, numero 4/2002, p. 29-33. Ĝi ja estas fidela al la originalo, sed mi havas la impreson ke ĝi iom tro pausas la germanan kaj pro tio iom pezas la stilo. Sed intertempe bona franca esperantisto skribis al mi ke mi malpravas. Do la legontoj mem juĝu !

Nova biografio pri Zamenhof en la germana

L. L. Zamenhof (1859-1917). Esperanto, Hillelismus (Homanismus) und die « jüdische Frage » in Ost- und Westeuropa, Andreas Künzli, eld. Harrassowitz, Wiesbaden, 2010, 538 + 24 paĝoj. Ampleksa kaj bone dokumentita verko pri la iniciatinto de Esperanto kaj pri kelkaj projektoj liaj, kun emfazo pri lia judeco.



Svisa kalendaro

Novembre

- 1 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 3 : Luzern : LES-Kunveno.
- 3 : Wil : EKW-Kunveno.
- 6 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Kultura seminario.
- 20 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
- 25 : Basel : ESB-Kunveno.

Decembre

- 1 : Luzern : LES-Kunveno.
- 1 : Wil : EKW-Rakledvespero.
- 4 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Kultura seminario.
- 11 : Basel : Zamenhofa festo en Mulhouse.
- 12 : Lausanne : LES-Zamenhofa Festo.
- 15 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 18 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato festa.

2011 Januare

- 5 : Luzern : LES-Kunveno.
- 10 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 22 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

Februare

- 5 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Kultura seminario.
- 7 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 10 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 19 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

Marte

- 5 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Kultura seminario.
- 7 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 10 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 19 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
- 26 : Tičino : Ĝenerala Asembleo de SES.

Aprile

- 4 : Lausanne : LES-Kunveno.

Maje

- 2 : Lausanne : LES-Kunveno.

Junie

- 18 : Lausanne : LES-Ekskurso.

Julie

- 1 : Redakta datlimo de *SES informas*.

Aŭguste

- 27 : Chaux-de-Fonds : SES-Festotago.

Septembre

Oktobre

- 10 : Redakta datlimo de *SES informas*.

Peto de la redaktoro

Bedaŭrinde la redaktoro kapablas anonci nur tion, kio estis sciigita al li. Tial li petas la asociojn kaj grupojn konigi la okazontaĵojn ne lastminute, sed konsiderante la redaktajn datlimojn, kiuj estas anoncigitaj en la kalendaro. Ankaŭ raportoj pri la okazintaĵoj bonvenas.